

# La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache.

Herausgegeben unter der Mitwirkung des Dr. Esperanto (Dr. L. Samenhof) von Chr. Schmidt, Vorstand des Welt-sprachevereins in Nürnberg.

Erscheint monatlich einmal.

Zu bestellen auf der Post und in der Buchhandlung von Heerdegen-Barbeck in Nürnberg.

Preis 1 Mark für das Vierteljahr (durch die Post 1.15 Mk.).

Anzeigen werden angenommen zu 20 Pfennig für die Petitzeile.

Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Sub la kunlaborado de Dr. Esperanto (Dr. L. Zamenhof) eldonata de Chr. Schmidt, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg.

Eliras unu fojon en la monato.

Oni povas aboni sur la poŝto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg.

Kosto 1 marko por 1/4 de jaro (per la poŝto 1 marko 15 pf.).

Anoncoj estas akceptataj por 20 pfenigoj por la petitlinio.

Nr. 1.

Nürnberg, 1. September 1889.

1. Jahrgang.

## Prospekt.

In kurzer Zeit hat die internationale Sprache des Dr. Esperanto in verschiedenen Ländern zahlreiche Freunde gefunden und täglich, ja stündlich wächst deren Zahl, so dass schon jetzt das Bedürfnis eines Organs, welches die Anhänger unserer Sache mit einander verbinden und die Möglichkeit bieten würde, sich gegenseitig zu besprechen und zu beraten, in hohem Grade sich fühlbar macht. Einer vielfach geäußerten Bitte entsprechend, haben wir uns entschlossen, eine Zeitschrift zu gründen, welche den Zweck verfolgen wird, für den Fortschritt und die Verbreitung dieser Sprache zu wirken.

Da unser Blatt das Centralorgan für alle unsere Freunde auf der ganzen Erde bilden soll, wird der Verfasser der Esperantosprache (Herr Dr. Samenhof) bei der Leitung dieses Unternehmens an der Spitze stehen.

Ausser dem reichen Unterhaltungsstoff zur Fortbildung wird unsere Zeitung auch stets Mitteilungen über den Gang unserer Sache, sowie Vor- und Ratschläge für alle diejenigen enthalten, welche sich in den Dienst unserer Bestrebungen gestellt haben. — An uns gerichtete Fragen werden unter der Rubrik »Antworten« stets pünktliche Erledigung finden.

Alle Freunde der Esperantosprache werden gebeten, uns über den Fortschritt unserer Sache an ihrem Platze jederzeit zu unterrichten; auch werden wir für jeden guten Rat oder Vorschlag, der auf die Förderung unserer Sache abzielt, stets dankbar sein.

Unsere Zeitschrift wird nicht allein unseren Freunden sehr willkommen erscheinen, sondern auch von solchen Personen mit Freuden begrüßt werden, die sich für die Weltsprache-Idee interessieren, bis jetzt aber aus irgend welchen Gründen unseren Bestrebungen ihre Teilnahme nicht widmeten.

Die Esperantosprache ist nicht abgeschlossen und unveränderlich. Was Ihre Zukunft betrifft, so äussert sich der Verfasser darüber wie folgt: »Ich habe zwar die Grundlage von dieser Sprache gegeben, was aber deren Weiterbildung anlangt, so liegt das Schicksal derselben in den Händen ihrer Anhänger. Es sollen von nun an ausschlaggebend sein: die Logik, das Talent und die Ansicht der Mehrzahl. Was in der Sprache beibehalten werden soll, darüber soll lediglich — ohne Rücksicht auf meine Person — die Majorität entscheiden.«

## Prospectus.

La langue internationale du Dr. Esperanto a trouvé en peu de temps bien des amis dans différents pays. Le nombre de ces amis s'accroît tous les jours, même d'heure en heure. Déjà maintenant le manque d'un organe se fait sentir au plus haut degré pour rallier tous nos amis et pour leur rendre possible de se communiquer mutuellement les desseins et les débats. A force de prières de nos amis nous avons résolu de fonder un journal qui a pour but de propager la langue internationale du Dr. Esperanto.

Ce journal, étant en même temps l'organe central pour tous les adhérents de notre cause, qui vivent dispersés sur toute la terre, l'inventeur (l'auteur M. Dr. Samenhof) de cette langue se chargera lui-même de la direction de cette entreprise.

Outre une riche matière de conversation pour se perfectionner dans cette langue, le journal contiendra toujours des communications du progrès de notre cause ainsi que des propositions et des conseils pour tous ceux qui se sont adonnés à notre cause. Toutes les questions seront toujours exactement répondues sous la rubrique »Réponses«.

Tous les amis de la langue internationale »Esperanto« sont priés de nous communiquer toujours le progrès de notre cause dans leur endroit. Nous serons aussi toujours reconnaissants de tout bon conseil ou de toute proposition qui aboutit à la propagation de notre cause.

A l'apparition de notre journal non-seulement nos amis ressentiront la plus vive joie, mais encore tous ceux qui ne se sont pas encore intéressés à nos idées je ne sais par quelles raisons.

La langue internationale »Esperanto« n'est pas encore fixée ni invariable. L'auteur s'exprime ainsi sur l'avenir de cette langue: J'ai donné seulement les principes de cette langue, mais quant à son développement, le sort en est mis dans les mains de ses adhérents. D'orenavant la logique, le talent et les avis de la majorité seront décisifs. La majorité décidera aussi — sans égard à ma personne — tout ce qui doit être retenu dans cette langue.

La langue internationale en question a une haute signification. Pouvoir réaliser cette idée,

## Prospekto.

La lingvo internacia »Esperanto« en mallonga tempo trovis multegon da amikoj en diversaj landoj. La nombro de tiuj ĉi amikoj kun ĉiu tago, kun ĉiu horo kreskas, kaj nun jam forte estas sentata la bezono de ia organo, kiu interligus ĉiujn la disĵetitajn amikojn kaj donus al ili la eblon paroli kaj konsiliĝi unu kun la alia. Obeante la peton de multegaj amikoj de la lingvo Esperanto, ni decidis fondi gazeton, kiu havos la celon labori por la progresado de tiu ĉi lingvo kaj por la vastigado ĝin en la mondo. La ĉefan kondukadon de nia gazeto prenis sur sin la aŭtoro de la lingvo mem (Dr. L. Zamenhof), kaj tial nia gazeto estos centra organo por ĉiuj disĵetitaj amikoj de nia afero.

Ekster la riĉa materialo por legi kaj por perfektigi en la lingvo, la leganto trovos en nia gazeto diversajn sciigojn pri la irado de la afero, proponojn kaj konsilojn por tiuj, kiuj volas labori por nia afero, kaj en la »Respondoj al la amikoj« estos donataj respondoj je la diversaj apartaj demandoj, kiuj venas de multaj personoj.

Ĉiujn amikojn de la lingvo Esperanto ni petas sendadi al ni ĉiam sciigojn pri la progresado de nia afero en ilia loko kaj ankaŭ proponojn kaj konsilojn, kiujn ili trovos utilaj por nia afero.

Nia gazeto havos intereson ne sole por la amikoj de la lingvo »Esperanto«; ĝi havos ankaŭ vivan intereson por ĉiuj, kiuj sin interesas je la ideo mem kaj ĝis nun ial ne aliĝis ankoraŭ al la amikoj de la lingvo »Esperanto«. La lingvo Esperanto ne estas fermita kaj neangebla. En la afero de la lingvo internacia diras la aŭtoro de tiu ĉi lingvo: »Mi ne volas esti leĝdonanto: mi donis nur la fundamenton, kaj nun mia rolo estas finita, kaj la sorto de la lingvo internacia sin trovas nun en miaj manoj ne pli multe ol en la manoj de ĉiu alia amiko de tiu ĉi lingvo. Leĝdonantoj en la afero de la lingvo internacia de nun devas esti nur logiko, talento kaj la opinio de la plejmulto. Ĉio en la lingvo devas resti tiel, kiel decidis la plej multaj, tute egale, ĉu mi persone konsentos aŭ ne.«

La demando pri lingvo tutmonda havas grandegan signifon. Se nia sankta celo estos atingita, tiam nia centjaro brilos eterne en la historio de la homaro. Kun la efektiviĝo de nia

Die Weltsprachefrage hat eine grosse Bedeutung, und die Durchführung dieser Idee wäre eine der schönsten Errungenschaften unseres Jahrhunderts, ein Glanzpunkt in der Geschichte der Völker; ja sie würde den kühnsten und teuersten Traum der Menschheit verwirklichen. Wir hoffen deshalb, dass allen, welchen das Wohl der menschlichen Gesellschaft am Herzen liegt, uns unterstützen werden, und dies umso mehr, als unsere Sache ja nur äusserst geringe Opfer und Arbeit erheischt. Die Esperantosprache ist so konstruiert, dass jeder gebildete Mensch nach dem Durchlesen der Grammatik, was kaum eine Zeit von 10 Minuten in Anspruch nimmt, im Stande ist, ohne irgend eine weitere Vorbereitung in unserer Sprache verfasste Bücher und Zeitungen lesen zu können. Wenn auch anfangs hier und da noch der Gebrauch des Wörterbuchs notwendig ist, so wird man doch bald desselben ganz und gar entbehren können. Hat man mehrere in dieser Sprache geschriebene Bücher oder einige Nummern von Zeitungen durchgelesen, so wird man die freudige Wahrnehmung machen, dass man mit dieser Sprache bereits vertraut ist, ohne sie eigentlich lernen haben zu müssen. Soll dieselbe nun möglichst rasche Verbreitung finden, so ist es unbedingt nötig, dass uns allseitige Unterstützung zuteil wird.

Wir hoffen, unsere Sache werde an der Gleichgültigkeit des Publikums nicht scheitern; wir haben im Gegenteil den begründeten Glauben, dass jeder Leser dieser Nummer nicht nur selbst mit Vergnügen unser Abonnent werden wird, sondern, davon begeistert und angeregt, unsere Zeitung auch unter seinen Freunden und Bekannten zu verbreiten sucht.

Vom 1. Oktober ab erscheint unsere Zeitung am 1. eines jeden Monats und zwar in derselben Grösse und Form, wie das vorliegende Blatt. Sie kostet vierteljährlich 1  $\mathcal{M}$ .

Die Redaktion.

ce serait un des plus beaux triomphes de notre siècle le comble de gloire dans l'histoire de peuples; le songe le plus hardi et le plus cher s'accomplirait. De là nous espérons que tous ceux qui prennent à coeur le bien-être de l'humanité nous aideront et d'autant plus parce que cette étude n'exige que fort peu de sacrifices et peu de travail. La langue internationale «Esperanto» est tellement formée que chacun, après avoir lu la grammaire — ce qui se fait en moins de 10 minutes — peut lire des livres et des journaux rédigés dans notre langue sans aucune autre préparation. D'abord il faudra recourir au dictionnaire ça et là, mais bientôt on pourra s'en passer tout à fait. Après avoir parcouru quelques livres rédigés dans cette langue ou quelques numéros de ces journaux, on s'apercevra avec beaucoup de joie qu'on comprend complètement cette langue sans avoir eu besoin de l'apprendre. Pour une propagation bien étendue et universelle il faut absolument que tout le monde protège notre entreprise.

Nous espérons que l'indifférence du public ne fera pas échouer notre cause; au contraire nous croyons à bon droit que tous ceux qui ont lu ce numéro, souscriront pleins de joie à notre journal et en répandront partout la nouvelle pour gagner des abonnés.

Le deuxième numéro paraît le premier octobre, et à partir de cette date le premier de chaque mois dans le même format que ce numéro. Le prix de notre journal est 1  $\mathcal{M}$  par trimestre.

La Rédaction.

afero efektiviĝos la plej kuraĝa, la plej kara sonĝo de la homaro. Tial ni esperas, ke ĉiu, al kiu la intereso de la homaro estas karaj, donos al ni helpan manon, tiom pli, ke nia afero postulas de ĉiu tre malmulte da oferoj kaj laboroj: la lingvon Esperanto oni povas ellerni en kelkaj tagoj, kaj tiuj, kiuj ne volas labori eĉ kelkajn tagojn, povas ellerni la lingvon eĉ tute sen laboro; ĉar la lingvo Esperanto estas tiel konstruita, ke traŭginte en 10 minutoj la malgrandan grammatikon, ĉiu bone edukita homo povas rekte, sen ia preparo, komenci la legadon de libroj aŭ gazetoj en tiu ĉi lingvo, kaj tiam li devos en la komenco de tempo al tempo enrigardi en la vortaron, sed post kelka tempo li tute libere komprenos ĉion sen vortaro. Traŭginte sen ia malfacileco kelkajn librojn aŭ kelkajn numerojn de gazeto en la lingvo Esperanto, ĉiu kun plezuro ekvidos, ke li jam scias tiun ĉi lingvon, tute ĝin ne lerninte. Ju pli da subteno oni oferos al ni, des pli rapide nia sankta afero atingos la celon. Ni esperas, ke nia afero ne rompiĝos pro la indiferenteco de la publiko, kaj ĉiu, kiu ricevos tiun ĉi numeron, ne sole mem kun plezuro fariĝos nia abonanto, sed li disvastigos ankaŭ nian gazeton inter siaj amikoj kaj konatoj.

La dua numero de nia gazeto eliros la 1an de oktobro kaj la sekvantaj numeroj elirados la 1an de ĉiu monato, en tiu sama grandeco kaj formo kiel la nuna numero. Ĝi kostas 1 markon por 1/4 jaro.

La Redakcio.

## Esperanto und Volapük.

Von Dr. L. Samenhof.

Die Bibel erzählt uns, dass einst die Menschen einen Turm bauen wollten, der bis in den Himmel reiche. Über dieses frevelhafte Unternehmen ergrimmt, verwirrte Gott ihre Sprache, so dass sie einander nicht mehr verstehen konnten. Daraus ging eines der grössten Übel der Menschheit hervor, unter welchem sie viel zu leiden hatte und heute noch zu leiden hat. In ihren Träumen versetzte sie sich oft in jene geschichtlich paradiesische vorbabylonische Zeit, welche für sie auf ewig verloren schien. Vergegenwärtigen wir uns die von Propheten und Dichtern besungene zukünftige Zeit, in welcher alle Menschen auf der Erde neben ihrer nationalen Sprache ein gemeinsames geistiges Bindemittel, eine gemeinsame Sprache besitzen werden, so fragt es sich, ob dieser Gedanke wirklich nur ein Phantasiegebilde, oder ob er realisierbar sei. In früheren Zeiten würde niemand diese Frage anders beantwortet haben als mit der Behauptung: „Ja, die Weltsprache ist ein Phantasiegebilde, welches niemals verwirklicht werden kann!“ Auch noch heutzutage finden sich unter den sogenannten „Selbstklugen“, welche jede neu auftauchende Idee ohne weiteres verwerfen und für absurd erklären, viele, die uns mit gebieterischem Ernst antworten: „Eine Weltsprache ist unausführbar, und diejenigen, die sich mit ihr beschäftigen, sind Dummköpfe.“ Sind zudem solche Selbstkluge einflussreich auf das Publikum, so sagt dieses das Gehörte blindlings nach und unterzieht sich nicht einmal der Mühe, näher zu untersuchen, was eine Weltsprache eigentlich ist, geschweige denn, dass sich jemand die Frage vorlegt, warum man denn diese Menschen Dummköpfe nennt — „wäre es nicht möglich, dass diese Dumm-

## Esperanto kaj Volapük.

De dro. L. Zamenhof.

En la profunda antikveco, rakontas la biblia legendo, la homoj volis konstrui turon altan ĝis la ĉielo. Ekkolerinte pro tiu ĉi fiera entrepreno de la homoj, Dio miksis ili an lingvon, kaj la homoj ĉesis kompreni unu la alian. Tio ĉi estis unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la homaro. Multe la homoj devis kaj devas suferi pro tiu ĉi mikso de la lingvoj, kaj tre ofte en siaj sonĝoj ili transportadis sin al tiu legenda, paradiza antaŭbabilona tempo, kiu perdiĝis por ili ŝajne je eterne. Prezente la pentrojn de ia feliĉa tre malproksima tempo estonta, la profetoj kaj poetoj promesas al ni, ke estos iam unu popolo sur la tuta tero kaj ĉiuj homoj parolados unu lingvon. Ĉu tiu ĉi dolĉa ora tempo estas frukto de fantazio neniam efektiviĝebla? Longan tempon neniu en la mondo respondus tiun ĉi demandon alie ol: „Jes, lingvo tutmonda estas dolĉa utopio, kiu neniam povas efektiviĝi!“ Kaj en nia tempo ankoraŭ la plej granda parto de tiel nomataj „prudentaj“ homoj, kiuj ne amas pripensi ian novan demandon kaj por kiuj ĉia nova celado estas absurdo, — kun jupitera graveco respondos al vi: „Lingvo tutmonda estas sensecaĵo, kaj tiuj, kiuj sin okupas je ĝi, estas idiotoj!“ Kaj se tiuj ĉi „prudentaj“ homoj havas ankoraŭ ian influon sur la amasoj, tiam tiuj ĉi amasoj blinde ripetadas iliajn vortojn kaj eĉ ne prenas sur sin la laboron rigardi, kio estas „lingvo tutmonda“, ne donas al si eĉ por unu minuto la demandon: kial oni nomas tiujn homojn utopiistoj? eble tiuj utopiistoj estas pravaj?

köpfe doch Recht hätten?“ — Der Gedanke der Weltsprache war übrigens so anziehend, als dass die Menschen ihn ganz aufgegeben hätten. Im Gegenteil fanden sich viele, welche diese Idee Jahre hindurch beschäftigte, ja welche für dieselbe teils praktisch, teils theoretisch thätig waren. Dank dem begeisterten und furchtlosen Arbeiten dieser Personen hat die Weltsprachefrage nach und nach ein grösseres Ansehen erlangt; ja man ist zu der Überzeugung gekommen, dass eine Weltsprache nicht absolut unmöglich ist. Man lernte einsehen, dass die Ausführung dieses erhabenen Gedankens nicht nur möglich ist, sondern dass die Realisierung desselben schon sehr nahe bevorstehen dürfte. (Wir sprechen selbstverständlich nur von solchen Personen, die mit Interesse die Entwicklung der Idee verfolgt haben; denn für jenen grösseren Teil der Menschheit, welcher sich dieser neuen Bewegung gegenüber gänzlich teilnamslos verhält, befindet sich unsere Frage noch auf derselben Stufe, auf welcher sie schon vor 1000 Jahren gestanden. Die unberechtigten Vorurteile solcher Leute hindern allerdings den Fortschritt unserer Sache; doch wenn dieselbe einmal ihr Ziel vollends erreicht haben wird, dann werden so manche aus deren Mitte gelehrte Abhandlungen über dieselbe schreiben.) — Als vor 10 Jahren unter dem oben geschilderten Stand der Dinge dem Publikum eine Kunstsprache unter dem Namen „Volapük“ vorgeschlagen wurde, als ferner die ungeduldige, für eine Weltsprache übrigens schon genügend vorbereitete Menschheit erwarten durfte, dass man nach diesen theoretischen Versuchen und Projekten ihr jetzt etwas Fertiges vorlege, als endlich Herr Schleyer sagte: „Hier habt ihr eine vollkommene Weltsprache, kommt und arbeitet!“ — da folgten die meisten Idealisten blindlings diesem Rufe, ohne sich zu fragen, was man ihnen unter dem Namen Weltsprache darbiete, ohne sich darum zu bekümmern, ob sie wirklich eine Sprache ist, welche die internationale Verbindung erleichtert und das verheissene Ziel in der That erreichen könne, oder ob sie sich nur in egoistischer Weise ohne Recht und Grund den ihr zukommenden Namen einer Weltsprache anmasse. Was sich oft in der Geschichte und im Leben wiederholt hat, bewahrheitet sich auch hier: Wenn wir uns lange nach irgend einem Wohlthäter geseht haben und es findet sich unverhofft ein solcher bei uns ein, so begrüßen wir denselben sofort mit Freuden und vertrauen zuversichtlich auf ihn, ohne uns vorher zu vergewissern, ob die fragliche Person auch im stande ist, sich wirklich als die von uns erwartete legitimieren zu können. Dank dieser überaus günstigen Stimmung, dank der überaus lobens- und bewunderungswürdigen Energie des Verfassers des Volapük und einiger seiner Freunde und vor allem dank der geschickten und wohl vorbereiteten Reklame hat Volapük viele Freunde erhalten, welche in ihrer Begeisterung auf dem gefundenen Wege vorwärts schritten, ohne einen Augenblick Umschau zu halten, ob die betretene Bahn in der That zum Ziele führe oder von demselben ablenke.

Volapük ist nicht der einzige Versuch, eine Weltsprache zu schaffen. Vor und nach demselben tauchten verschiedene Weltsprachensysteme auf, die aber, ohne Anhänger gefunden zu haben, bald nach ihrem Entstehen wieder verschwanden, da sie keine fertigen, überlegten, erprobten, sondern nur unklare Projekte darboten. Besonders schlecht erging es denjenigen Systemen, welche nach dem Volapük hervortraten, da alle von der Idee selbst Begeisterten bereits Volapükisten gewesen und deshalb die neuen Systeme nicht nur nicht unterstützten, sondern im Gegenteil im Interesse einer Sprache für die ganze Menschheit sich bemühten, jeden neuen Versuch zu unterdrücken. Die sogenannten praktischen Menschen, welche es unnötig gefunden haben, für Volapük zu arbeiten, wollten auch nicht für die

Sed la ideo de lingvo tutmonda estis tro altiranta, por ke la homoj tute rifuzigus je ĝi. Trovis sin homoj, kiuj laboris super tiu ĉi afero, oferis al ĝi multajn jarojn, faris diversajn provojn de praktika efektivigado de tiu ĉi ideo, aŭ prilaboradis la demandon teorie. Danke la senlaca kaj sentiman laboron de tiuj ĉi personoj, la demando pri la lingvo tutmonda iom post iom komencis ricevadi tute alian vidon. Iom post iom oni venis al la konvinko, ke lingvo tutmonda tute ne estas absolute ne ebla. La homoj komencis kredi, ke la efektiviĝo de la sankta ideo ne sole estas tute ebla, sed ke al tiu ĉi efektiviĝo ne estas jam tre malproksime. (Ni parolas, kompreneble, nur pri tiuj personoj, kiuj kun intereso observadis la disvolvon de la ideo; ĉar por tiu grandega plimulto de la homoj, kiuj estas surdaj kaj blindaj por ĉia nova movo — por ili nia demando staras nun ankoraŭ sur tiu sama ŝtupo, sur kiu ĝi staris antaŭ mil jaroj. Per malsaĝa kaj nepripensita ridegado ili penas malhelpi la progresadon de la afero. Sed kiam la afero tute atingos la celon, — tiam tiuj ĉi sinjoroj skribados pri ĝi instruitajn traktatojn.)

Ĉe tia staro de la demando al la publiko antaŭ 10 jaroj estis proponita arta lingvo sub la nomo „Volapük“. La mondo estis jam sufiĉe preparita por lingvo tutmonda kaj atendis senpacience ke post ĉiuj teoriaj projektoj kaj provoj oni prezentu al ĝi fine ion pretan; kaj kiam sinjoro Schleyer diris: „jen vi havas pretan lingvon tutmondan, venu kaj laboru!“ — tiam amasoj da idealistoj sin ĵetis al tiu ĉi voko blinde kaj tute ne demandante sin, kion oni donis al ili sub la nomo de lingvo tutmonda, ĉu ĝi estas efektive lingvo faciliganta la interkomunikiĝon internacian kaj ĉu ĝi povas efektive iam fariĝi lingvo tutmonda, aŭ ĝi estas nur uzurpatoro, kiu tute sen rajto kaj fondo alprenis nomon ne apartenantan al ĝi. Ripetiĝis tio, kio ofte ripetiĝas en la historio kaj en la vivo: kiam ni longe kaj senpacience atendas iun nekonatan bonfaranton, tiam se venos al ni la unua sin trovinta persono kaj anstataŭ ĉia legitimado li nur diros al ni, ke li estas tiu sama persono, kiun ni atendas, — ni blinde nin ĵetas al lia kolo!

Danke la tre favoran staton de la animoj, danke la tre laŭdindan kaj mirindan energion de la aŭtoro de Volapük kaj de kelkaj ĝiaj amikoj, kaj ankoraŭ pli danke la tre lerte uzatan reklamon, Volapük trovis multajn amikojn, kiuj trovinte unu fojon ian vojon, kiu promesas konduki ilin al nia celo, ekiris sur tiu vojo, tute ne demandante sin en la minutoj de flameco, ĉu ili efektive elektis la bonan vojon aŭ dekliniĝis flanken.

Volapük ne estas la sola provo por krei lingvon tutmondan. Estis multaj provoj antaŭ la Volapük kaj post ĝi. Sed ili ĉiuj, donante nenion pretan, pripensitan kaj elprovitan, prezentis nur neklarajn projektojn kaj perdiĝis tuj post la naskiĝo, ne povinte ricevi eĉ unu adepton. Aparte malbona estis la sorto de tiuj sistemoj, kiuj naskiĝis post Volapük. Ĉar ĉiuj idealistoj, kiujn altiradis la ideo mem, jam estis volapükigitaj kaj tial ne sole ne subtenis la novajn sistemojn, sed kontraue, en la intereso de unu lingvo por la tuta homaro ili penadis dispremi ĉian novan sistemon;

neuen Systeme eintreten, weil sie hierin gleichfalls keinen materiellen Gewinn erblickten. Dass Volapük den Weg für die neuen Systeme geebnet habe und denselben den Kampf erleichtere, ist, wie aus den vorerwähnten tatsächlichen Verhältnissen hervorgeht, eine falsche Ansicht; denn jeder neue Versuch begegnete infolge des Volapük nicht nur irgend einem Freunde, sondern vielmehr vielen Feinden. Wo Volapük Gegner gefunden, da traten auch den neuen Systemen solche entgegen und zwar mit noch grösserer Hartnäckigkeit, weil die neuen Vorschläge zur Schaffung einer Weltsprache häufig den Gegenstand des Spottes bildeten und noch bilden. Wo hingegen Volapük Freunde sich erworben, da sind bereits auch wirkliche Feinde der neuen Systeme vorhanden, welche lediglich darauf ausgehen, dieselben zu vernichten. Wo haben sie auch Anhänger finden können? Fast nirgends. So kam es, dass diese neuen Versuche, die in kurzer Zeit so viele Arbeit und Opfer verschlangen, nicht aufkommen konnten.

Unter solch ungünstigen Umständen trat die Esperantosprache hervor, und es war den Freunden des Verfassers derselben nicht zu verdenken, dass sie diesem von der Veröffentlichung seines Systems ernstlichst abrieten. Nichtsdestoweniger wagte er die Herausgabe seines Werkes, zu dessen Verlag sich wegen des bereits verbreiteten Volapük lange Zeit kein Buchhändler verstehen wollte. Sobald jedoch die Esperantosprache in weiteren Kreisen bekannt wurde, wandte sich das Blatt. Sie fand bald zahlreiche Freunde und Gönner, die sich täglich vermehrten. Diese rekrutierten sich einerseits aus solchen Personen, von welchen man scheinbar nichts erwarten konnte, andererseits aus Gleichgültigen, die von Volapük nichts wissen wollten und für die Weltsprache für immer verloren schienen. Sie wurden warme Anhänger der Esperantosprache, da sie einsahen, dass dieselbe tatsächlich eine praktische Sprache ist, welcher unbedingter Nutzen und dauernder Bestand innewohnt. Ja sogar viele Volapükisten, welche den grossartigen Unterschied zwischen der Esperantosprache und dem vielgepriesenen Volapük erkannten, stellten sich bald auf Seite Esperantos, obwohl sie bisher eifrige Förderer und Verteidiger des Volapük waren und auch die Esperantosprache anfangs mit allen Kräften zu unterdrücken suchten (so war beispielsweise der Herausgeber dieser Zeitung Vorstand des Nürnberger Volapükklubs, welcher nun mit seinen Mitgliedern zur Esperantosprache sich bekennt). Auch viele andere begeisterte Volapükisten, welche z. Z. mit Volapük noch eng verwachsen sind und noch nicht den Mut haben, öffentlich sich auf unsere Seite zu stellen, haben mir das Zugeständnis gemacht, dass sie in der Esperantosprache den einzigen und besten Weg sehen, auf welchem unser Ziel zu erreichen ist, und sie korrespondieren schon sehr gut in dieser Sprache. Jedoch der grösste Teil der Anhänger des Volapük erblickt in der Esperantosprache noch einen Feind, der mit allen Mitteln bekämpft werden müsse. Fast alle diese Herren haben bis jetzt noch gar keine Idee von der „internationalen Sprache“ und deren Zweck, ja in fanatischer Hartnäckigkeit würdigten dieselben meine erste Schrift nicht einmal der Durchsicht (so gestanden mir frühere Volapükisten offen zu, dass sie meine Broschüre, obwohl sie in deren Besitz waren, lange Zeit nicht lasen, weil sie überzeugt waren, dass dieses System gänzlich unnütz wäre). Dies erinnert an die Zeiten der Inquisition, in welchen es so manchem guten Christen als Todsünde angerechnet wurde, wenn er irgend ein Buch zur Hand nahm, worin nur der geringste frische Hauch zu spüren war. Zu solchen Personen will ich selbstverständlich an dieser Stelle nicht sprechen, es wäre ja doch jedes Wort umsonst; denn dieselben würden sich mit Entsetzen die Ohren verschliessen. Jedoch befinden sich unter

kaj ĉiuj tiel nomataj homoj „praktikaj“, kiuj trovis malutile labori por Volapük, ne volis ankaŭ labori por la novaj sistemoj, ĉar ankaŭ en tiuj ĉi sistemoj ili trovis nenian utilon. „Volapük“, diras multaj, „ebenigis la vojon por novaj sistemoj kaj faciligis al ili la batalon!“ Sed vi vidas, sinjoroj, ke ĝi estas tute ne tiel: Volapük ne faciligis, sed forte malfaciligis tiun ĉi batalon; ĉar la novaj provoj, veninte en la mondon, renkontis danke la Volapükon — jam neniun amikon, sed multajn pretajn malamikojn. Kie Volapük en sia tempo renkontis malamikojn, tie ankaŭ la novaj sistemoj renkontis tiujn samajn malamikojn, ankoraŭ pli obstinajn, ĉar la „naskigado de ĉiam novaj lingvoj tutmondaj“ aldonis ankoraŭ pli da nutro al ilia ridado; kaj kie Volapük renkontis amikojn, tie la novaj sistemoj jam rekte renkontis malamikojn, kaj ankoraŭ malamikojn ne pasivajn, sed penantaj rekte ilin detruu. Kie do ili povis trovi amikojn? Preskaŭ neniu! Jen estas la kaŭzo kial ĉiuj novaj provoj, el kiuj ĉiu englutis kredeble ne malmulte da tempo, laboro kaj oferoj materialaj, mortis preskaŭ tuj post la naskigo.

